4-a Jaro. N-o 169 APERAS SEMAJNE 29. Decembro 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

SIBERIO POST 10 JAROJ

En Siberio pli malfrue, ol en eŭropaj landpartoj de USSR estis komencita la landrekonstruo. Ĉi-tie longe mastrumadis "or-epoletuloj"[1])-dunguloj de interna kaj eksterlanda burĝaro. Ĝis la revolucia periodo oni konis Siberion nur kiel punlokon. Kompare al aliaj landpartoj, eks-cara registaro malpli zorgis pri disvolviĝo de kultura kaj mastruma stato de Siberio kaj pro la cirkonstancoj la kulturiga laboro ĉi-tie estis komence la plej malfacila. Tamen ĉiom sumiĝinte ĝis la tago de la 10-jara datreveno de Oktobra Revolucio, la siberia laboristo kaj vilaĝano povas fieri pro siaj, kvankam ne multaj, sed sufiĉe grandaj atingoj, kiujn ili nun havas, forbalainte ĉiujn parazitojn kaj ekspluatintojn.

Jen pervida ekzemplo de la kresko de siberia industrio (en mil-rubloj laŭ ĝismilita valoro): 1913 j.: 96 683,3 = 100 %, 1921/22 j.: 35 634 = 36,7 %, 1926/27 j.: 104 012 = 107 %.

La sama kresko estas konstatata en agrikultura mastrumaĵo. Bildo de pligrandigo de kulturigata terspaco laŭ jaroj estas tia:

en 1913	—	5950,3	desjatinoj[2])	(100 %)
„ 1922	—	3996,5	„	(60 %)
„ 1927	—	7151	„	(120 %)

La samon konstatas ankaŭ pligrandigita kvanto da fervoj-transportaĵo sur la tuta siberia fervojo.

Ekzemple: en jaro 1913 sur la siberia fervojo estis transportitaj 5 680 000 tunoj da transportaĵo (100 %); en jaro 1923 2 344 000 t. (52 %), kaj dum la jaro 1927 ĝis 1928 entute ne malpli ol 10 304 000 t., kio egalas, kompare al la jaro 1913 al 181 %. La sukceso estas tiom pli atentinda, ke dum la periodo de civitana milito (1919/21) siberia fervoj-transporto estis preskaŭ tute detruita.

En Sovetio, — samtempe kun kresko kaj fortigado de landmastrumaĵo, — kreskas ankaŭ bonstato de Laboristaro. Komparante salajr-nivelon de laboristoj en jaro 1913 kaj 1927, ni vidas, ke meza monat-salajro en jaro 1927 rilate al jaro 1913, estas jena:

Tekstilindustrio . . .	109,8 %
Ledindustrio	124,8 %
Karbindustrio . . .	105,7 %

Tiamaniere havante okhoran labortagon (anstataŭ 10—12-hora ĝismilita), ni havas en ĉef-industrio de nia landparto la realan nivelon de la mez-salajro pli altan, ol ĝismondmilitan.

Same kreskis bonstato de siberia kamparano, ekz.: en jaro 1923 tuta produktado de vilaĝano estis egala, en ĝismilita monvaluto, al 57 rubloj, en jaro 1927 ĝi estas jam 81 rubloj.

Rilate al la kultura nivelo Siberio estis ankaŭ la plej malprogresema landparto. Laŭ la ŝtat-registro de 1897, en vilaĝ-lokoj de Siberio legoscia loĝantaro konsistis el: viroj 15,1 %, inoj 3,1 %. En jaro 1920 el: viroj 26,4 %, inoj 9 %; en 1926 el: viroj 40 %, inoj 14,1 %. Sekve dum ses jaroj de sovetia potenco elcento de gelegosciuloj en siberiaj vilaĝoj kreskis plimulte ol dum 23 jaroj pasintaj de j. 1897 ĝis 1920. Eks-cara reĝimo elspezis por elementa popol-klerigado en siberia landparto 4 400 000 da rubloj. Soveta registaro por la sama celo elspezis en lernjaro 1926/27 19 500 000 da rubloj kaj por j. 1927/28 estas asignite 23 milionoj. Ĝis la revolucio la pordoj de universitatoj kaj super-lernejoj en la lando estis fermitaj por infanoj de laboruloj. Nuntempe 57 % da tuta lernantaro en super-lernejoj estas infanoj de laboristoj kaj kamparanoj.

Transirante al la dua dekjaro de Oktobra Revolucio ni, siberianoj, notas ĉi-tie niajn sukcesojn certe ne por halti ĉe jam atingita nivelo, sed por ke ni ankoraŭ antaŭen moviĝu samtempe kun kresko de nia tutlanda mastrumaĵo, plibonigante nian bonstaton.

Kompiltradukis *B. Zirjanov* (Kurgan).

[1]) Tiel oni nomis blankan militestraron.
[2]) 1 Desjatino = 1,09 hektaro.



INFANOJ EN DANĜERO

En Germanio, en la regna parlamento, en la amasaj kunvenoj decidiĝas dum semajnoj kaj monatoj la furioza batalo pri "kultur"-problemo inter unuigita reakciularo kaj (plej amplekse dirite) — progresemularo. Temas pri livero de la germana lernejo al la eklezio. Multaj legante tion miros pri tiu fakto, ke post naŭjara ekzisto de "germana respubliko" reakciaj elementoj ankoraŭ povas atingi tiajn sukcesojn, ke la leĝo pri sklavigo de lernejoj sub religi-katedra jugo estas realigota. Sed oni atentu, ke en la plej granda germana ŝtato, Prusio, estas koalicia registaro inter demokratoj, liberaluloj, katolika partio kaj socialdemokratoj! Do la protesto de socialdemokratoj kontraŭ la "nova lerneja leĝo" nur povas esti formala, sed ne praktike signifa, pro tio, ke unu koalici-alianculo ne volos ofendi la alian en intereso de tiu koalicio. Kaj la katolika partio tute nature estas la plej radikala rilate al la religi-influo por la lernejoj. Tamen ĉiuj batalantoj, kiuj honeste deziras malhelpi la reakcian atencon al la popolaj lernejoj, mobiliziĝis por rebati la atakon. Kaj helpas ne nur

la plenaĝuloj, sed ankaŭ la laboristaj infanoj mem.

Mi volas rakonti nur unu okazintaĵon el la praktiko (kiu antaŭ nelonge okazis). En unu Berlina komunuma (t. e. popola) lernejo 11-jara knabo brute estis bastonbatita de ĉefinstruisto, pro ridinde bagatela "krimo" (rideksplodo dum leciono ĉe maljuna instruistino, kies pedagogiajn ne-kapablojn eĉ devis konfesi kelkaj ŝiaj kolegoj. La instruistino denuncis tiun "krimon" al ĉefinstruisto, kiu *ne* esplorante la fakton kaj la kaŭzon, furioze batis la knabon. Krevo de l' haŭto, sangkuntiriĝo (blunigraj makulegoj) jen la sekvo de batoj. Tion atestis kuracisto skribe. Alian tagon mi intervjuis kun tiu knabo (kiu estas sengepatra) kaj lia plenaĝa fratino la gvidanton de la lernejo. Tiu faris dolĉan mienon kaj manovris kun la celo forŝovi nin kiel eble plej rapide el la ĉambro. Ni protestis, kaj li venigis la bateman instruiston, kiu devis plene konfesi la maljuston de sia ago. Sed tio ne sufiĉis al ni, ĉar li estis dirinta diversajn mensogplenajn asertojn. Do ni publikigis la aferon en "Ruĝa Standardo". Post tio la patrinoj de multaj infanoj vizitantaj tiun ĉi lernejon, kolektiĝis antaŭ la pordo de la lernejo, ege pridiskutis la aferon kaj timigis tiamaniere la instruistojn kulpajn, ke ambaŭ forestis pli ol unu semajnon, ŝajnigante malsanon.

Ĉar ni ankoraŭ deziris havi "organizan" sukceson, ni decidis aperigi unufojan eldonon (hektografite) de "lerneja (ĉel-)gazeto".

Ĝi aperis dufolia en kvanto pli ol 200-ekzemplera kaj estis disdonata de junulo matene antaŭ la instruado. Pri tio la infanoj ege ĝojis, dancis surstrate pro plezuro, kaj instruistoj troviĝis ĉe malplenaj klasĉambroj. Komenco de instruo prokrastiĝis je ½ horo. En tiu "gazeto" ni klarigis al la infanoj la kialon de tiuj instrumetodoj al la instruistaro kaj ankaŭ postulis, ke ili turnu sin al siaj gepatroj por liberigo de religia instrufako. Kiam la infanoj forlasis la lernejon, ili rimarkis antaŭ la pordo policanon kune kun la gvidanto de la lernejo. Ĉe kunveno publike aranĝita sekvantan dimanĉon de "Junpionira Ligo". partoprenis 50—60 infanoj el tiu lernejo. Sed instruistoj severe esploris pri eldon-deveno de l' gazeto kaj, kiu el infanoj apartenas al junpioniroj. Pri la gazeto nenion ili povis ekscii, sed pioniroj libere deklaris ke ili estas membroj de la Ligo (ĉar la Ligo estas legala). Tiam instruistoj diris, ke ili eksiĝu el la Ligo aŭ transiru en alian lernejon! Tamen instruistoj ĝis nun nenion riskis fari, ĉar ili rimarkis, ke ankoraŭ ne venis la horo, por efektivigi ĉiujn dezirojn de reakcio, kaj ke ankoraŭ aktivas la kontraŭaj faktoroj!

Norbert.

Ĉu vi jam renovigis vian membrecon al SAT?

Junaj Sindikatanoj en Brita Disvenda Industrio

La junula movado ĉe nia sindikato (Tutlanda Unuiĝo de Butikhelpantoj, Tenejistoj, kaj Oficistoj — National Amalgamated Union of Shop Assistants, Warehousemen and Clerks) estas ankoraŭ ne plenkreska. Antaŭ 1926 ĝi ne ekzistis. En februaro de 1926 nia ĉefa Londona Distrikta Organizisto, K-do G. Maurice Hann, konceptis la ideon starigi junulan movadon por la junaj ĝis-dudekunujaraj anoj de ĉi tiu Distrikto de nia sindikato. Sekve, la Londona Distrikta Konsilantaro kunvokis je la 28-a marto 1926 Konferencon de junaj delegitoj el ĉiuj Londonaj filioj. Okdek delegitoj ĉeestis. La Konferenco elektis komitaton por kunordigi la agadojn de la junaj anoj en la distrikto kun la celo unuigi la junajn gelaboristojn kaj geoficistojn en la Londona Disvenda Industrio.

Je la Ĝenerala Ĉiujara Kunveno de nia sindikato, paske 1926, la delegitoj ordonis al nia Centra Ekzekutiva Komitato, ke ili metu sur la tagordon de T.U.C. (Brita Sindikatara Kongreso) la jenajn proponojn: — 1. Pro la granda danĝero al la vivnormo per la dungado de malaltpagita junula laboro en butikoj, oficejoj kaj tenejoj, malprofite al la plenaĝuloj, ĉi tiu Konferenco sugestas al gepatroj kaj zorgantoj la gravecon instigi gejunulojn en aliaj propraj familioj, ke ĉi tiuj aliĝu la Unuiĝon tuj kiam ili iĝos elekteblaj.

2. Ĉi tiu Sindikatara Kongreso ordonas al ĝia Ĝenerala Konsilantaro, ke ili komencu klopodojn por la organizado de junaj laboristoj laŭ la bazo de plenaj rajtoj, plimalaltaj kotizoj kaj eniraj kostoj, kaj ili penu instigi ĉiun anigitan sindikaton ŝanĝi ĝiajn regulojn por tiu celo, kaj ke la Ĝenerala Konsilantaro donu plenan raporton al la venonta Sindikatara Kongreso.

3. Ĉi tiu Sindikatara Kongreso ordonas al ĝia Ĝ.K., ke ili vigle subtenu jenojn: —

a) La redungadon de ĉiuj senlaboruloj, kaj teknikan edukadon por ĉiuj junaj ĝis 18-jaraj gelaboristoj ĉe specialaj fakoj en la laborejoj, laŭ bazo de pagita laboro laŭ la sindikataj salajrotarifoj.

4. Leĝa minimuma salajro kaj leĝa seshora tago por ĉiuj junaj gelaboristoj.

5. Malstarigo de noktlaboro por ĉiuj ĝis 18-jaraj gelaboristoj.

6. Malstarigo de individuaj meti-lernantaj kontraktoj. Kontrolado de meti lernantoj per la Fabrikejaj Laboristgvidantoj kaj la Sindikatoj.

Dum la jaro 1926 nia anaro estis trookupata pro la Ĝenerala Striko kaj ĝiaj rezultoj, kaj pri la Amalgameca Problemo: sekve la junula movado en mia sindikato malmulte progresis. Malgraŭ tio, oni kunvokis Gejunulajn Konferencojn ĉe la nordaj provincoj (urbo Newcastle [Njukasl]) kaj ĉe la orienta provincaro (urbo Ipswich [Ipsŭiĉ]) kaj ĉe la Okcidenta Skotlanda Distrikto (urbo Glasgow [Glasgo]).

Ĉe la supre-menciita Newcastle-a konferenco oni diskutis kaj akceptis jenan Konstitucion: — 1. La Konsilantaro nomiĝu Norda Distrikta Junula Konsilantaro. 2. La tasko antaŭ la Konsilantaro estas, stimuli la intereson de la filioj en la distrikto por junaj gelaboristoj kaj helpi la varb-agadon. 3. Ĉiu filio en la provincoj Durham kaj Northumberland povas sendi po du deligitoj al la N.D.J.K. 4. Aniĝkotizoj estu po unu penco por ĉiu ano ĉiujare de ĉiu filio. 5. La N.D.J.K. kunvenas ĉiujarkvarone, en februaro, majo, aŭgusto kaj novembro. 6. La estraro konsistas el: — prezidanto, vic-prezidanto, kasisto, sekretario, kaj unu delegito. Ili estas la Ekzekutiva Komitato.

Dum ĉi-jaro oni starigis junulajn sekciojn en 22 urboj: —

Ĉeestis unuajn kunvenojn de 40 ĝis 300 anoj.

Dum nia Ĉiujara Ĝenerala Kunveno, paske 1927, la delegitoj tieaj ordonis al nia Centra Ekzekutiva Komitato, ke ili metu al la T.U.C.-a tagordo saman rezolucion kiel la lastan jaron, sed kun jenaj aldonitaj vortoj: —

Plie, la Ĝenerala Konsilantaro devas kreskigi Laboristan Sportan Movadon per la sindikatoj por allogi junajn gelaboristojn al la Laboristara Movado kaj por reteni ilian intereson pri ĝi.

Tiu Ĉiujara Ĝenerala Kunveno ankaŭ akceptis jenan rezolucion: —

"Sciante la gravecon kuraĝigi la junajn anojn al la agemeco de la taskoj de la Unuiĝo, ĉi tiu Ĉ.Ĝ.K. instigas ĉiujn Distriktajn Konsilantarojn, ke ili starigu Junulajn Sekciojn por kunordigi kaj komenci klopodojn pri la varbado kaj retenado de junaj gelaboristoj: kaj plie, ĉi tiu Ĉ.Ĝ.K. ordonas al la E.K., ke ili kunvoku Tutlandan Konferencon por Jun-anoj ĝis 25-jaraj la 30. septembro 1927 por firmigi la agadojn de la diversaj Junulaj Sekcioj."

Dum la jaro 1927 nia Centra E.K. sendis ordonojn al ĉiuj Distriktaj Konsilantaroj, ke ili starigu junulajn sekciojn. Depost ilia stariĝo, ĉiuj el tiuj ĉi Junulaj Sekcioj estis tre agemaj por la propagando. Ili disdonis multajn milojn da presitaj propagandiloj en iliaj distriktaj butikejoj, tenejoj kaj oficejoj. Ili kunvokis multajn propagandajn kunvenojn, kunlaboris kaj kunhelpis tre lojale al la plenaĝaj.

En la Suda-Kimria-Distrikto oni nun starigas ligon, kiu entenos ĉiujn piedpilkklubojn en niaj sindikatfilioj.

La tasko antaŭ niaj Distriktaj Konsilantaroj por starigi ĉi tiujn Junulajn Sekciojn ankoraŭ ne finiĝis. Ni havas ankoraŭ multan laboron por fari. Nia Nacia

E.K. prokrastas ĝis la 29. Januaro 1928 la daton de la Tutlanda Junula Konferenco por doni plilongan tempon al la Distriktaj Konsilantaroj por fini ilian laboron.

Aliaj sindikatoj en Britio, vidinte en nia Unuiĝo la starigon de Junula Movado inspiriĝis kaj formas similan movadon por siaj jun-anoj. Ni fidas nian junularon, kredante, ke en iliaj manoj la estonteco de la Brita Sindikata Movado tre prosperos kaj fortiĝos.

Stanley W. Brooke, oficisto de la NAUSAW. kaj C. (8500).

KIEL ONI PREPARAS EN FRANCIO LA SPIRITOJN POR LA VENONTA "LASTA" MONDMILITO

Mi iris lastsemajne al *Odeon,* unu el la kinematografejoj en *Marseille.*

Laŭ la nova aranĝo, oni montras nun en preskaŭ ĉiuj kinematografejoj aŭ spektaklejoj ne unu solan teatraĵon, sed fragmentojn el kelkaj diversspecaj filmoj. Kaj krom tio kantistoj, ekvilibristoj ktp.

En la unua parto estas montrataj la "aktualaĵoj". Tie, oni vidas nepre ĉiufoje francan generalon aŭ marŝalon paradantan antaŭ soldatoj, disdonantan dekoraciojn, salutantan nacian flagon. Dum tiu tempo, kompreneble, la muzikistaro aŭdigas militistajn ariojn.

Poste estas montrata kvazaŭ militbildo. Komercŝipo estas postkurata de submarŝipo; hidroplanoj faligas apud ĝi fumigajn bombojn, kiuj postlasas ĉirkaŭ ĝi fumnubojn. Tiamaniere la komercŝipo iĝas nevidebla de la submarŝipo; kiam ne plu estas danĝere, la komercŝipo eliras el la fumnubo kaj daŭrigas sian iradon. Oni ne diras, ke la submarŝipo estas germana, sed, ĉu ne, — nur la germanoj estas sufiĉe sovaĝaj por uzi siajn submarajn ŝipojn kontraŭ la pacajn komercŝipojn.

Poste sursceniĝas kantisto, kiu konigas parton de sia repertuaro. Inter la diversaj kanzonoj estas nepre unu almenaŭ patriota. En la unua strofo, francaj virinoj estas laŭdegataj. Ili estas la plej belaj, la plej graciaj, la plej sindonaj, la plej spiritaj inter ĉiuj en la tuta mondo; nur en Francio estas eble trovi tiajn idealajn virinojn.

En la dua strofo, estas la vico de la francaj vinoj. Nur ĉi tie oni povas trovi bonajn, fortigajn kaj sanigajn vinojn; tuj kiam la landlimo estas trapasita, tio fariĝas neebla.

En la tria, temas pri glorindaj monumentoj, memorlokoj. Ankaŭ en nia lando oni trovas la plej noblajn, la plej belajn; ekzemple tiuj, kiuj estis starigitaj ĉe *Verdun,* sub la bordoj de la *Marne,* de l' *Yser,* de la *Somme* por rememorigi pri la sangigaj kaj mortigaj bataloj liveritaj de la "soldatoj de l' rajto", kompreneble la niaj, al la sovaĝaj "germanoj".

Estas malĝojige vidi la ĉeestantaron aplaŭdi vidante aŭ aŭdante tiajn idiotaĵojn. Vere, la verkisto franca *Renan* multege pravis, kiam li skribis ke "Kio plej bone komprenigas la senfinecon, tio estas la stulteco de la homaro". Estus bone, ke la proletoj sin pli intime grupigu por iri en tiajn lokojn kaj brulaŭte protesti, kiel cetere ili faris en multaj urboj en *Francio* ĉe la montrado de la *"Granda Militista Parado".* *Tranĉilo.*

Al la laborulo

Laborulo vekiĝu
Konu vian forton
Je la voko: Leviĝu!
Ŝanĝos vi la sorton.

Vi ekestros fabrikojn
Kaj trafikon, kampojn
Vi forigos la sklavojn
Kaj la sklavigantojn.

Ĉu vi volas? Do agu,
Por ke vi sur tero
Iom ankaŭ ekĝuu,
Ne — nur en ĉielo.

5194.

Salajroj de instruisto en Sovetio

La Centra Komitato de profsindikato de Instruistaro en Sovetio antaŭnelonge faris detalan studesploron pri nunaj salajroj de instruistoj en Sovetio. Kelkaj ciferoj, kiuj pleje prezentas tiun ĉi demandon, estas citataj el oficiala revuo de Financa Komisario "Financoj kaj Ŝtatekonomio" (n-oj 38—46 el j. 1927).

La meznivela salajro de instruistoj en duagradaj lernejoj (tio estas la aritmetika rezulto, se oni la tutan monatan salajraron dividos je la kvanto de instruistoj) estas montrita en jenaj kolonoj laŭlande. La unua kolono montras la meznivelan salajron en nunaj (ĉervoncaj) rubloj, la dua — en antaŭmilitaj rubloj per transkalkulo laŭ proksimuma (rondcifera) koeficiento — 0,5.

	en nuntempa valuto:	en antaŭmilitaj rubloj:
USSR	54.63	27.31
Rusio (RSFSR)	57.65	28.82
Ukrainio (USSR)	47.13	23.56
Blankrusio (BSSR)	50.00	25.00
Transkaŭkazio (ZSFSR)	45.13	22.56
Uzbekio	76.28	38.14
Turkmenio	82.22	41.11

Antaŭ la milito la salajro de ŝtataj instruistoj estis 75 rubloj por la normo de 12 unuhoraj lecionoj dum semajno. Nun kiel normo de instruista salajro estas fiksitaj 18 lecionoj dum semajno. Konformante la antaŭmilitan salajron de l' instruisto en duagrada lernejo laŭ nuna normo, oni havos ekvivalenton de 112,5 rubloj. Kompare kun la antaŭmilita kaj samnorma salajro, la nunaj salajroj de instruistoj konsistigas jenajn procentojn de l' antaŭmilita salajro:

USSR	24,2%
Rusio	25,6%
Ukrainio	21,0%
Blankrusio	22,0%
Transkaŭkazio	20,0%
Uzbekio	33,9%
Turkmenio	36,5%

Tiuj ĉi rezultoj de l' studesploro, farita de Instruista Profsindikato refutas la oficialan konkludon laŭ kiu la nuna salajro de l' instruistoj atingis 42% de la antaŭmilita.

La salajroj de instruistoj varias ne nur laŭ nomitaj landoj (regionigitaj kiel suverenaj respublikoj), sed ankaŭ laŭ tarifaj zonoj sur la teritoro de sama respubliko.

Kiel plej malaltajn salajrojn oni citas 37,59 rubloj monate por la instruistoj de unuagrada lernejo en Blankrusio (por la semajna normo de 24 lecionoj) kaj 45,13 rubloj por la instruisto de duagrada lernejo en Transkaŭkazio, kiel plej altaj salajroj estas notindaj (monate).

	unuagrada lernejo	duagrada lernejo
En gubernio de Moskvo	55,41	72,02
Uzbekio	69,26	76,28
Turkmenio	54,97	82,22

Elĉerpis *3637.*

ATENTU SOVETIANOJ!

Por senŝarĝigi la funkciadon de l' SAT-perejo ĉe CK. SEU, la Administracio de SAT kun ĉi-anonco ekfunkciigas kroman specialan

AGENTEJON DE SAT por Suda Sovetio

(Ukrainio, Krimeo, Nord-Kaŭkazio, Transkaŭkazio)

Adreso: KREMENĈUG, "Esperanto".

La Gek-doj el suda parto de Sovetio bonvolu denun ĉian monon por SAT sendi al tiu agentejo. Aliĝiloj kaj aboniloj estu preferinde senpere sendotaj al la Adm. de SAT en Leipzig.

La Administracio de SAT

LA KOOPERATIVA MOVADO EN BRITIO

La ĵus de Kooperativa Unuiĝo eldonita inform-tabelo (Propagand-organo de la Britaj Kooperativoj) montras, ke la Kooperativa Movado kreskas je pli granda rapideco ol iam ajn antaŭe.

En jaro 1910 la pomalgrande vendantaj kooperativoj havis *2 541 734* anojn kaj je la fino de la jaro 1926 ili atingis la nombron de 5 186 728 anoj. — La plialtiĝo dum 16 jaroj estas de *2 644 994* aŭ alidire pli ol 100%.

En la jaro 1926 la nombro de novaj membroj kreskis je *275 745*. Tiu ĉiujara plialtiĝo estis antaŭe nur dufoje pli supera — en 1919 kaj en 1920 (jaroj de komerca prosperego), kiam la kooperativoj gajnis sinsekve *284 946* kaj *373 375* membrojn — aŭ sume 658 *321* en la daŭro de tiuj du jaroj.

Tamen la plejgranda nombro de kooperativoj posedas kompare tre malgrandan nombron da membroj kaj en multaj okazoj ili laŭcele tute similas unu la alian. La unuiĝo ĉu centraligo ŝajnus esti tre facile realigebla.

La meznombro da membroj je kooperativo estas 4052.

El 1280 kooperativoj, kiuj havas 5 186 128 membrojn, 1016 estas kun malpli 1016 ol 4000 membroj kaj en tio 594 kooperativoj kun malpli ol 1000 membroj.

Tiuj kooperativoj prezentas el 46.40% el la tuta nombro de kooperativoj. Dume al la Kooperativa Unuiĝo apartenas kooperativoj kun *259 338* membroj, kio prezentas apenaŭ 5%.

Kooperativa movado disvolviĝas bone. Jam ekzistas 10 kooperativoj kun pli ol po 50 000 membroj.

La plej forta kooperativa movado estas en la provinco *Lancashire* (Lankaŝir), kie unue formiĝis la nuna sistemo de kooperativa pogranda kaj pomalgranda komercado.

La tuta kapitalo de la pomalgrandaj kooperativoj, laŭ la informtabelo de la Kooperativa Unuiĝo, sumis £ 104 035 373. El tiu £ 86 525 445 estas akcikapitalo, la resto prunteprenita.

Verkita laŭ artikolo de "Daily Herald" (Ĉiutaga Heroldo). *E. Doran (7516).*



"Sennaciulo" — danĝera por la Ĉeĥoslovakia armeo

Jeno okazis: K-do-kolportisto sendis "S-ulo"-n al iu K-do-soldato en kazernon. Tie iu oficiro tradukigis ĝin kaj trovinte ion pri Sovetio malpermesis transdoni ĝin al la K-do, kiu de tiam estas atenteme observata. La K-do ĝin komprenebIe plue regule ricevadas, sed — alivoje.

Por bone tion kompreni estas necese scii, ke la soldatoj kaj ĝendarmoj ne posedas la balotrajton kaj ne devas partopreni ian ajn societan vivon.

Oficiroj, buĉistoj de la Sovetia popolo el la Oktobra Revolucio, daŭras malami Sovetion. Ili neniom ŝanĝiĝis, sed des pli ŝanĝiĝas la soldatoj. Oni nur instruu al ili svingi la armilon, iam ili tion eble bezonos. *(5194.)*

VOJAĜOJ

Kiam mi legas memorlibrojn de alilandanoj, kiuj dum la pasintaj jarcentoj vojaĝis en Francio, ŝajnas al mi, ke la rapideco de la veturiloj ne sufiĉe plirapidigis ĝis nun, — dum nia maŝina jarcento, — la konatiĝon inter popoloj.

Korpoj rapidiĝis, sed ne la spiritoj.

Ĝis la deknaŭa jarcento, la vojaĝantoj konatiĝis inter si dum longa vojaĝo, konatiĝis kun enloĝantoj de trapasataj landoj. Nun, ili tiom rapide trapasas, ke anglo, ekzemple, povas vojaĝi de Boulogne (Bulojn) ĝis Italio, nur ekkonante, dum sia trairo en Francio, francan doganon, vagonrestoracion, necesejon, internacian vagondormejon, elirdoganon.

Kaj li diros: "Mi travojaĝis Francion. Estas ebena lando, kie virinoj estas ruĝharaj."

Tiel vojaĝi estas tute senutile tiel je sociala kiel persona vidpunkto. Estas nur trouzo de transportiloj.

En Parizo, oni tiom kutimas vidi *nur* alilandulojn en "aŭtokaroj"[1]), kaj *nur* alilandulojn, ke juna knabeto, unuafoje veturanta en aŭtokaro, diris al sia patro:

— Do, paĉjo, la angloj *estas ni* hodiaŭ?

La lastan jaron, mi ne plu scias post kia diskutado de la ĵurnalaĉaro, dum kelkaj semajnoj, azenaj francaj naciistoj, iĝinte frenezuloj, protestis sur strato

[1]) Grandaj aŭtomobiloj per kiuj ĝenerale karavanoj travojaĝas la urbon por ĝin povi rapide vidi.

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo deka)

Samtempe kun la kulto al mortintoj ekzistis ankaŭ kredo, ke la hejma fajro estas diaĵo. Ĉiu hejmo estis ia templo kun fajrujo kiel altaro. Tie devis senĉese, tage kaj nokte, bruli la *sankta* fajro. Ĉiuvespere oni kovris la karbojn per cindro kaj la unua zorgo matene estis reflamigi la fajron. Se ĝi estingiĝus estus granda malfeliĉo! La fajron oni adoris; al ĝi oni kultis per diversaj ritoj. Oni oferis al ĝi florojn, fruktojn, incenson, vinon; al ĝi oni fervore preĝis: "Ho, fajrujo, faru, ke ĉiam prospero kaj feliĉo estu al ni; ho, ci, kiu estas eterna, bela, ĉiam juna, ci, kiu nutras, ci, kiu estas riĉa, akceptu niajn oferojn kaj kompense donu al ni feliĉon kaj la sanon, kiu estas tiom dolĉa[19])".

Ĉe la komenco kaj ĉe la fino de la manĝo oni preĝis al la fajro-dio. Oni oferis al li la unuaĵojn (premicojn) kaj vinon. Ĉu firme kredis, ke la dio manĝas kaj trinkas. La manĝaĵoj estis dividataj inter la homo kaj la dio; la manĝo estis sankta ceremonio.

[19]) Laŭ *Makrobo.*

Tiu hejma religio ekzistis ankaŭ ĉe la hindoj: "La religio de la sankta fajro ekzistis depost la malproksima kaj nekonata epoko, kiam ne jam estis grekoj, nek italoj, nek hindoj, sed nur azianoj (arianoj). Kiam la triboj disiĝis, ili kunportis kun si tiun kulton, unuj sur la bordojn de la riverego Gango, aliuj sur la bordojn de Mediteraneo. Pli poste, inter tiuj apartiĝintaj triboj, ne plu havantaj inter si rilatojn, unuj adoris Brahmon, aliuj Zeŭson, aliuj Janon; ĉiu grupo faris al si diojn. Sed ĉiuj konservis kiel antikvan donacon la unuan religion, kiun ili kreis kaj praktikis ĉe la komuna naskiĝloko de la raso[20])."

Tiu hejma religio, tiu kulto al mortintoj tute ne similis la hodiaŭajn religiojn. La ĉefa regulo estis, ke nur la familianoj povis ĉeesti la religiajn ritojn. La funebraj ceremonioj povis esti plenumataj nur per la plej proksima parenco de la mortinto. Ĉiun eksterfamilianon, eĉ se li estis amiko, oni severe malakceptis.

La sankta fajro, tiom intime ligita kun la kulto al mortintoj, estis ankaŭ la nura propraĵo de ĉiu familio aparte. Ĝi reprezentis la praulojn, ĝi estis la providenco de unu sola familio kaj havis nenion komunan kun la fajro de najbara hejmo. Ĉiu fajrujo protektis siajn hejmanojn. La pastro de tiu religio estis la patro aŭ la familiestro.

[20]) *Fustel de Coulanges,* La Antikva Civito.

Fustel de Coulanges en sia verko: *La Antikva Civito,* el kiu ni ĉerpis materialon por ĉi tiu ĉapitro, kolektis multe da argumentoj por pruvi, ke tiu hejma religio naskigis la propraĵrajton.

Ni male emas pensi, ke la propraĵrajto kaj la religio estiĝis samtempe el la fakto, ke la italaj kaj grekaj antikvuloj, preterpasinte la nomadan stadion, kvazaŭ enradikiĝis sur la terpeco, kiun ili kulturis. La ekonomia neceseco, kiu ĉiam estas *racia,* trudis al tiuj antikvuloj la laŭfamilian produktmanieron. Kaj el tio verŝajne rezultis la hejma religio kaj la propraĵrajto. La spiritostato de la tiutempuloj estante ne racia, sed male superstiĉa, religia, kreis iun sensencan ideologion. Kaj tiu ideologia superstrukturo fariĝis realaĵo, kiu forte efikis sur la spiritojn; ĝi ludis tre gravan rolon en la rilatoj inter la homoj kaj ofte metis fortan baron al la normala evoluado de la socio.

Ekzemple, ĉe la komenco bieno ne povis esti vendata. Kaj poste, kiam la ekonomia neceso devigis vendi kampon, la vendanto tamen konservis la posedon

kontraŭ alilandanoj, fajfis kaj ĵetis ŝtonojn en aŭtokarojn.

Kamaradoj alilandaj, demandu viajn samlandanojn, kiuj vizitis Parizon: Ĉu vi konatiĝis kun francianoj?

— Ho, jes. Mi vidis turon Eifel, palacon Louvre (Luvr'), preĝejon Sainte-Chapelle (Sent' Ŝapel') kie, feliĉe, oni ne plu preĝas, la tombejon "Panthéon" (Panteon'), la triumfarkon kun tombo de ...

— Bone, sed, ĉu vi konatiĝis kun francianoj?

— Jes, mi vidis en muzeo "Louvre" (Luvr') la bildojn de Napoleono, de Ludoviko XIV-a, de Francisko I-a, de Henriko IV-a rajdanta sur aglo, de ...

— Bone, sed, ĉu vi ekkonis vivantajn francojn?

— Jes, mi vidis multajn sur stratoj, kie ni veturis en aŭtokaroj. Ili rigardis nin mokeme aŭ malameme ...

— Kompreneble sur strato troviĝas ofte la plej stultaj, senzorgaj, la policistoj, la provincanoj, kiuj ĉiam miras. Sed, ĉu vi konatiĝis ...

— Mi konis la pordiston de hotelo, iun drinkeman blankrusulon el Vrangela armeo kaj dekkvinjaran grum-knabon, diboĉeman franculeton. Vi scias, ke francoj estas tre diboĉemaj ...

— Mi ne scias, ĉar mi ne konas ilin. Sed ĉu vi ne konis aliajn francojn, ol rusan pordiston kaj diboĉeman grum-knabon? ... Ne? ...

Do, vi ne vizitis Franclandon, sed nur Francŝtonaron. Vi revenis kun mankoj, kiel iu vojaĝanto, kiu revenus el dezerto, ne vidinte kamelon. Lernu esperanton kaj dum via proksima vojaĝo ekkonatiĝu kun homoj de la lando, kiun vi vizitos!

Pensu ankaŭ pri jeno kiam vi eksterlanden ekvojaĝos: Ĉu mi sufiĉe povos respondi al miaj aliandaj Gek-doj pri mia propra lando? Pri laborista movado, bonaj libroj, muzikaĵoj, bezonoj, mankoj, historio de mia propra regiono?

Ni eklernu ...

Jief (7359).

★

Proletoj rompis limojn

Manifestacio kontraŭ la naciecaj instinktoj kaj por la sennaciismo, kiu profunde enradikiĝas en la amasoj de Proletaro ĉiulanda kaj ĉiunacia, estis la "Ruĝa Tago" en Trier. (Ni ĉerpas el raporto aperinta en "Ruĝa Fronto", novembra eldono, ĉar neniu SAT-ano loĝas en tiu urbo nek ĝia proksima ĉirkaŭaĵo, kiu povus liveri al ni rektan informon). Tiu mezgranda urbo en Rejnlando, ne malproksima de Saar-teritorio, Lotaringio (Loreno) kaj de Luksemburg estas absolute regata de katolikaj episkopoj kaj pastroj. Ĝi estas vera "nigra angulo". La laborista movado estas tie tre malforta kaj ankaŭ esperantista grupo (ĉu burĝa, ĉu proleta) laŭ nia scio neniam tie ekzistis.

En tiu urbo manifestaciis la "Ruĝfrontanoj" kunvenintaj el diversaj proksimaj lokoj. Malgraŭ kontraŭstaro de pastroj, oni povis rimarki en diversaj stratoj prop.-ornamaĵojn. Kiam la manifestantoj pretermarŝis la kazernojn en kiuj estas enloĝigitaj francaj trupoj (laŭ Versaj'a traktato), la francaj soldatoj per laŭtaj, ĝojaj aklamoj esprimis sian simpation kun la proletoj en Ruĝfronta Ligo organizitaj. El tio evidentas, ke tiuj proletoj-K-doj, devigitaj de imperialista registaro survesti uniformojn de nacia armeo, vigle sentis sian klasan kunligitecon kun tiuj "germanaj" ruĝfrontanoj. Spontane montriĝis, ke la naciajn sentojn tute ekstermis la proletara klaskonscio. Ĝojiga signo por la sennaciuloj!

Norbert.

★

TAGO EL MIA VIVO

Mi tre ĝuas la skizojn en *Tago el mia vivo,* kiujn priskribas alilandaj K-doj, ĉar ili montras kiel simila fundamente estas la vivo de ĉiuj laboristoj.

Mi estas 26-jara, edzigita, fervoj-kontisto ĉe la komercaĵa deponejo en *Birmingham* (Bermingn). Mi laboras nuntempe nokte ĉe la ekspeda aŭ faktura fako. Mi ellitiĝas inter la 12-a ĝis 13-a horo kaj mi tagmanĝas. Posttagmeze mi kutime legas: laboristajn ĵurnalojn, socialistajn propagandilojn, politikajn kaj ekonomiajn librojn kaj lunde "S-ulo"-n. Mi ludas (aŭ eble "skrapas") violonon; mi tre ŝatas Bethovenajn verkojn, ofte mi ankaŭ promenas en la parko aŭ "ĝardenas".



El hejmo mi elliras je la 18-a h. kaj devas veturi ĉ. 14 kilometrojn al mia oficejo. Mi komencas la laboron je la 19-a h. kaj finas ĝin je la 2,30-a h. (matena horo). Ni do laboras, kiel vi vidas, 7½ horojn senĉese. Mi manĝas dum la laboro.

Mia laboro — kontrolo de la ekspedataj pakaĵoj — ne estas laciga, sed tre unutona kaj la nokta laboro iom neagrabla. Mi ankaŭ faras fakturojn kaj skribmaŝinas ĉ. 3,50 ĉiunokte. Ni povas libere interparoladi, se tio ne ĝenas la laboron. La noktlaboro estas tiel same salajrata kiel la taglaboro. Sed ĉiu deka nokto estas libera.

Elirinte el la oficejo mi biciklas hejmen, kien mi alvenas je la 4-a h. kaj tuj enlitiĝas.

La kontistoj ne estas bone organizitaj, nur 30% apartenas al la Unuiĝo.

Mi estas loka faka komitatano, kiu traktas pri la laborkondiĉoj ktp. ĉe la deponejo.

Laborante en la tempo, kiam aliaj estas liberaj, mi ne povas ofte kunvenadi kun aliaj kaj restas tro ofte soleca.

Iwa Roberts (1840).

P. S. (postskribaĵo): Mi ĵus sciiĝas, ke mi laboros — post unu-du semajnoj tage; do "Tago el mia vivo" ŝanĝiĝos.

---

de la tombo, kiu troviĝis en la kampo kaj la ĉiaman rajton ĝin trapasi por iri plenumi la religiajn ceremoniojn. Alia ekzemplo: Du domoj ne povis tuŝi unu la alian. Komuna muro por du domoj estis io tute ne ebla. Ĉe Romo la leĝo difinis spacon da du kaj duono da futoj inter ĉiu domo. Ĉiu familio, posedante siajn proprajn diojn kaj kulton, bezonis nepre havi izolitan loĝejon, templon, kie ĉiame brulis la sankta fajro kaj vivis la animo de la prauloj.

"La propraĵrajto estis starigita por plenumi heredan kulton. Pro tio ne estis eble, ke tiu rajto malaperu post la mallonga ekzisto de individuo. La homo mortas, la kulto restas; la fajro ne devas estingiĝi nek la tombo esti forlasata. Ĉar daŭras la hejma religio, la propraĵrajto devas daŭri ankaŭ."

"Du aferoj estis intime ligitaj en la kredoj same kiel en la leĝoj de la antikvuloj: la kulto (ceremoniaro) de familio kaj la propraĵrajto de tiu familio. Tiel estis senescepta regulo, en la greka juro same kiel en la roma juro, ke oni ne povis akiri la propraĵon sen la kulto, nek la kulton sen la propraĵo ...[21])."

(Pluo sekvos) *E. Lanty.*

[21]) *Fustel de Coulanges,* La Antikva Civito.

KELKAJ PENSOJ

La kultoj, kiaj ajn ili estu, estiĝis pro la teruro; estas ĝi, kiu, iam, per ili plenigis la mondon.

Per la laboro, multe pli ol per la milito, la homo evidentigis sian kuraĝon; per la laboro, multe pli ol per la pieco, progresas la justeco. Kaj se, iam, nia agema speco atingos la feliĉon estos ankoraŭ per la laboro.

Proudhon (Prudon).

*

Kiam la socialismo estos varbinta, estos al si alpropriginta ĉion, kio vagas ankoraŭ, kvazaŭ turmentitaj animoj, tra la mondo, — kiam ĝi estos fariĝinta la bono, la centro, la rifuĝo de la disigitaj animoj, tiam la kapitalismo estos formortinta.

Kiam la laboristo estos akirinta tion, kion la sindikatistoj nomas klasa konscio, kiam li estos konstatinta la dependecon ekonomian, juran kaj politikan, al kiu lia tuta klaso estas kondamnita, ŝajnos al li, ke ne estas multe da diferenco inter lia kondiĉo kaj vera sklaviĝo. Estas la akra klasa konscio, kiu formas la bazon de la sindikatismo.

S. kaj *B. Webb.*

TRA ESPERANTIO

KVAR TASKOJ DE PROLETA ESPERANTISTA AKTIVULARO

Kvar estas tiuj taskoj kaj ilin bone memori kaj laŭeble bone plenumi devas ĉiu klaskonscia SAT-ano. Jen estas ili:

— 1. Atentante tion, ke ni fariĝas neeviteblaj heredantoj de la neŭtrala esperanto-movado, ke nur la organizita klaso laborista sukcesos antaŭenpuŝi kaj realigi enkondukon de lingvo internacia en la ĉiutagan praktikon kaj uzon — ni pliintensigu la praktikan uzon de esperanto, ni vastigu nian internacian laboristan korespondadon kaj priservadon de la gazetoj laboristaj ĉiulandaj, ni pliintensigu la propagandon de esperanto inter Laborularo kaj ni zorgu, ke ĉiu nova ano de la laborista esperanto-movado estu utila batalanto por nia porlingva propagando kaj per-lingva agado.

2. Memorante, ke esperanto estas kaj devas esti konsiderata nur kiel instrumento por realigo de internacia solidareco kaj por starigo de fortikaj internaciaj interligoj. — Ni zorgu pri konforma eduk- kaj kultur-kleriga laboro inter la esperantistoj malnovaj kaj la nove-varbitoj. Ni instruu al niaj kunlaborantoj la spiriton revolucian de *sennaciismo* kaj de klasbatalo. Nur tion realiginte, ni garantios konstatantan plukreskon de sindona batalantaro por niaj ideoj.

3. Ĉar la gvidado de la tuta esperanto-movado finfine devos trafi en la manojn de revoluciaj laboristaj-esperantistoj, — necesas, ke vastigante la nombron de esperanto-adeptoj kaj edukante ilian klaskonscion, ni samtempe zorgu pri pliprofundigo de iliaj esperanto-konoj kaj esperanto-scioj. Ni devas el niaj vicoj prepari spertajn K-dojn, kiuj povus en ĉiuj fakoj uzi nian lingvon kaj tiamaniere preni en niajn manojn la gvid-standardon de la organizita esperanto-aplikado, kiun komencas jam ellasi el siaj manoj la neŭtrala esperantistaro kaj UEA.

4. Nova soci-klaso, arde celanta ŝanĝon de la nun-ekzistanta soci-ordo kaj ordigon de maljustaĵoj kaj malbonaĵoj nuntempaj, devas plejgrade science kaj objektive pravigi sian taktikon rilate al tia grava problemo, kia estas la problemo pri lingvo internacia. La lingvoscienco de la pasinto, kreskinta sur bazo de burĝa nacieca kulturo — ne volis kaj ne povis ĝis nun kaj ne sukcesos dum estonto — doni la necesajn sciencajn argumentojn por pravigi la ekzisteblon de lingvo internacia. Desmalpli ĝi sukcesis elmontri kaj bone argumenti la vojojn, kiuj estas devigaj por tiu enkonduko de la lingvo internacia. Tial uzante la metodojn de historia materialismo, de dialektiko marksista, — ni devas laŭeble subteni ĉiujn klopodojn celantajn pliprofundigi niajn sciojn pri vojoj de evoluo dę lingvoj naturaj — uzataj kaj de lingvo internacia. Mirindaj metodoj de materialista filozofio, bazitaj sur la koncepto de socia evoluado kaj principoj de klasbatalo — malfermas al ni perfektan eblecon — science argumenti kaj malkaŝi tiujn vojojn de kolektiva lingvo-kreado, kiujn ĝis nun sekvis kaj estonte devos sekvi esperanto.

Ne simple subteni kaj simpatii esperanto-movadon, sed scii ĝin ĝuste, utile kaj konforme al la leĝoj de socia evoluo, devas ĉiu aktiva klaskonscia SAT-ano. Estas bone, ke tiuj problemoj jam estas pritraktataj en presorganoj de SAT, sed tiu pritraktado devas fariĝi ankoraŭ pli profunda, ankoraŭ pli diversflanka. SAT devas larĝe diskonigi ĉiujn laborojn tiurilatajn.

Diskonigante ilin, ni almilitos la rondojn gvidatajn de la penso revolucia, ni kreos la necesan sciencan fundamenton, sur kies bazo fariĝos pli facila kaj malpli kritikebla nia plua laboro kaj batalado.

Moskvo 19. XI. 27.

E. Drezen.

SEMAJNO EL MIA VIVO

Mi devas ellitiĝi — ĉiutage — je la duono de la sesa. Post trikvaronhora biciklado mi alvenas mian laborejon. Mi estas meĥanikisto, 22-jara kaj laboras en la ĉefurbo ĉe la muntado de aŭtomataj telefoncentroj. Mi laboras de la 7-a matene ĝis duono de la 6-a. Intertempe ni havas dufoje kvaronhoron por manĝo. Je la duono de la 7-a mi alvenas hejmen. Tiam mi vespermanĝas. Post ĝi mi legas librojn, aranĝas miajn esperantajn aferojn, ekzercadas violonludon kaj je la 10-a enlitiĝas. Marde dumtage mi laboras kaj je la duono de la 8-a mi kun mia edzino — kiu estas ankaŭ klaskonscia laboristino, esperantisto, kiu laboras ne nur hejme sed ankaŭ en fabriko — iras esperantan grupejon. Tie ni interparoladas pri novaĵoj el tutmondo kaj priparolas societajn aferojn. Je la duono de la 10-a ni ekiras hejmen kaj enlitiĝas je la 11-a. Merkrede vespere post vespermanĝo—kiel ĉiutage—mi tralegas tagan ĵurnalon, poste mi foriras al violon-leciono. Mi revenas hejmen kaj enlitiĝas je la 11-a. Ĵaŭde mi vizitas socialdemokratan partiejon, kie ni pridiskutas politikajn temojn. La vendredan vesperon mi povas min okupi per studado de diversaj temoj, priartaj, historiaj, politikaj, aŭ mi legas romanojn de Barbusse, Rolland Romain, London, Shaw, Gorkij, France, ktp. Je la 10-a mi enlitiĝas. Sabate mi laboras ĝis la duono de la 1-a. Somere mi iras posttagmeze al Danubo por bani aŭ boatveturi aŭ mi aranĝas esperantajn aŭ partiajn aferojn. Vespere je la 7-a mi iras esperantan grupejon, de tie je la 9-a mi devas eniri mian laborejon, kie dumnokte ĝis la 5-a mi devas labori. Mi alvenas dimanĉe matene je la 6-a hejmen kaj kun mia edzino mi iras somere al Danubo, printempe kaj aŭtune mi ekskursas piede al diversaj lokoj. Ni estas anoj ankaŭ de Naturamikoj.

Ni alvenas hejmen inter la 9-a kaj la 10-a. Vintre ni vizitas teatrojn, aranĝas komunajn kunvenojn, kie ni pasigas la posttagmezon. Finiĝis la semajno.

Kiel vi povis konstati mi devas labori ne 48 horojn, sed 58 horojn tage kaj 8 horojn nokte, ricevante por tiu laboro 52 pengojn (9½ dolaroj) en la plej kara lando de mezeŭropo. Kaj mi estas proporcie bonege salajrata. Tial ja restas tre malmulte da tempo por sin klerigi kaj konsiderante, ke aliaj laboristoj eĉ pli multe devas labori, oni povas kompreni la kaŭzon de ĝenerala malklereco en Hungario.

SAT-ano 2828.

Ju pli da abonantoj havos SENNACIULO, des pli da potenco havos SAT.

Abonu kaj abonigu ĝian organon, se vi sincere kaj inteligente deziras la prosperon de la Laborista Esperantista Movado.

*

KIEL ORGANIZI LA KOOPERATIVAN SEKCION ĈE SAT

Mi ne parolos pri la neceseco de tia Sekcio, ĉar ĝi ja estas tre evidenta.

Sed ni alpaŝu senpere al la bazoj de nia fondita kaj evoluigota Sekcio. 1. Unue — ĉiuj SAT- kaj Kooperativanoj devas *koni* sin reciproke. Pro tio kaj por tio mi proponas, ke ĉiu SAT-membro, estante ankaŭ aktiva ano de sia loka aŭ enlanda Kooperativa organizo, anoncu tion al la kompilanto de Jarlibro kaj presigu en la adresaro la vorton: "Kooperativano" — aŭ — se ili estas oficisto de iu Kooperativo, ke li indiku tion.

2. El ĉiu lando k. lingvoregiono anoncu sin 1 aŭ pliaj Gek-doj, kiuj emas: a) al kunlaborado en koop.-gazetoj de sia lando, kaj b) al kunlaborado por la Koop.-SAT-Sekcio.

La Koop.-SAT-Sekcio publikigus en *Sennaciulo* eventuale *Sennacieca Revuo* iliajn artikolojn pri la stato, vivo, pro-

gresoj, ĉefaj okazintaĵoj kaj novaĵoj, venkoj, spertoj ktp. en la koop.-movado de apartaj landoj, kiuj povus interesi la tutmondan legantaron kaj instigi la SAT-membrojn al aktiva partoprenado en koop.-movado, kiu ja estas ekonomia bazo de socialisma venko. Tiujn ĉi artikolojn la SAT-anaro kooperativa tradukus nacilingven por siaj enlandaj koop.-organoj.

La sama SAT-sekcio dissendus la ricevitan materialon, kiu ne povus esti presita en niaj organoj pro manko de loko, al korespondantoj sin anoncintaj el diversaj landoj, por enpresigi ĝin (post traduko) en la landaj koop. gazetoj kiel senpera materialo ricevita de la *Koresponda Servo Kooperativa ĉe SAT*.

3. La kunlaborantoj traduku aŭ resumu la plej interesajn koop. artikolojn el sia landa koop.-gazetaro kaj sendu ilin ĉu senpere multobligante al diversaj eksterlandaj koop.-gazetoj ĉu per la koncerna korespondanto, aŭ — se ankoraŭ tiu ne ekzistas en iu lando — per la subskribita gvidanto de Kooperativa SAT-sekcio, kiu havas adresojn de koop.-gazetoj de ĉiuj landoj kaj dissendos la ricevitan materialon (ekzamenitan laŭ faka vidpunkto), plej celkonscie al tiuj koop.-gazetoj, en kiuj — li esperas — ili estos presitaj.

4. La kunlaborantoj anoncu sian pretecon al tradukado de plej eminentaj koop.-verkoj el sia landa lingvo en esperanton, por ke ni povu baldaŭ alpaŝi al eldonado de Internacia Laborista Kooperativa Gvid- kaj Legolibro.

5. Fine — kiel komencon de la supre cititaj farotaj laboroj, mi donas la adresojn de la ĝis nun sin anoncintaj Gek-doj el la Kooperativa SAT-Sekcio — por eventuala senpera interrilato:

1. **Britio:** K-dino *Beatrice France* (SAT 508), *Manchester-Handforth*, "Rosa", Wilmslow Road.
2. **Francio:** K-do *Hector Cachon* (SAT 24), *Paris V*, 6 rue Pierre Curie kaj K-do *Glodeau*.
3. **Germanio:** a) K-do *Guhr, Artur* (SAT 4247), *Seifhennersdorf b. Zittau*, n-o 190, *Saksio*. b) K-do *Hermann Nonnenmann* (SAT 510), *Stuttgart-Cannstatt*, Lazarettstr. 38, I. c) *H. Theobald* (SAT 348), Im Haag 5, *Steenkamp-Hamburg*.
4. **Sovetio:** K-do *Ilia Gude* (SAT 7935), *Ostrov*, Uritskaja 10, Pskovokrug kaj K-do *V. Jarov* (SAT 4791), *Bogorodsk*, Kooperativnaja 10, Moskva Gubernio.
5. **Polio:** *Jan Zawada* (gvidanto de Koop. SAT-Sekcio), *Warszawa*, ul. Grazyny 13, dom "Spotem", Polio (samtempe sekretario de Kooperativa SAT-Sekcio).

Pluaj anoncu sin al la supre citita adreso. *J. Z.*

*

ANKORAŬ PRI KORESPONDADO KUN EKSTERSOVETIA LABORISTARO

Ni ne parolos tie-ĉi pri tre ofta neakurateco en la respondoj de niaj eksterlandaj korespondantoj; pri tio, ke niaj petoj pri la informo restas plejparte neplenumataj. Tie-ĉi ni parolos nur pri tio, kiel niaj sufiĉe diligentaj kaj akurataj korespondantoj fuŝas la aferon per tio, ke ili respondas tro malfrue.

Preskaŭ ĉiuj blankrusiaj nacilingvaj gazetoj ŝatas la leterojn de l' eksterlandaj laboristoj kaj kamparanoj kaj volonte presas ilin. Ne ĉiam ili presos ĉiun leteron, sed nur tiun, kiu pli konvenas al la tempo. Tre interesa, ekz., estos la letero de iu ĉina kamparano dum ĉinia revolucio, sed tiu letero fariĝos neinteresa kaj nepresinda, kiam tiu revolucio estas, ekz., pasinta kaj neniu plu pri ĝi parolas. Same estos kun la leteroj el Anglio dum la striko de karbministoj. Tion bone komprenas ĉiuj SAT-anoj, kiuj serioze provas utiligi espon por praktika laboro, kaj sovetaj K-doj tion konstante ripetas en gazetoj kaj perletere al siaj korespondantoj: ne malfruiĝu, komunikante iun interesan fakton, ĉar per malfruo vi tute senvalorigos vian leteron.

Ni, Minskaj SAT-anoj, estas tre malfeliĉaj en tiu afero. Ni plejparte ricevas el eksterlando tiajn senvalorigitajn leterojn kaj tial ne ĉiam kaj ne ĉie povas ilin presigi, kvankam la cirkonstancoj estas ĉe ni tre favoraj. Mi donos kelkajn ekzemplojn: K-dino M. el Francio alsendis al ni interesan leteron pri la 1-a de majo en Paris, leteron, nepre presindan, sed ... la letero estis skribita la 19-an de majo kaj alvenis al ni la 27-an, kiam neniu jam parolis pri maja festo en eksterlando. La letero eniris arkivon.

K-do N. el Essen partoprenis nunjaran kunveturon de ruĝfrontbatalantoj en Berlin; li priskribis (tre interese) al ni tiun kunveturon, sed nur tiam, kiam li revenis en Essen kaj iom ripozis. Rezulte ni povis utiligi tiun ĉi leteron nur al 3—4 gazetoj, kvankam ĝi povas esti presita en kelkdeko da gazetoj.

Da tiuj faktoj mi povas doni tre multe. Mi donos nur la lastan, tre brilan fakton pri salutleteroj al sovetaj laboristoj okaze de festo de Oktobra Revolucio. Ĉiuj, sendube, scias kian grandan propagandan signifon havas tiuj leteroj. Ni ĉiamaniere (per "S-ulo", per bulteno de K-do Bässler, per privataj leteroj) petis, ke oni ne malfruu kun tiuj leteroj kaj ilin sendu pli frue, eĉ en la komenco aŭ meze de oktobro. Kaj kio okazis? Niaj gazetoj komencis prepari oktobrajn festnumerojn kaj petegis niajn salutleterojn. Ni havis nur 3 leterojn kaj estis devigataj ilin multobligi, dissendi la samajn al ĉiuj gazetoj. Nur al 2 gazetoj ni sukcesis doni po 5—6 leteroj. La festnumeroj jam aperis, kiam oni komencis nin superŝuti per salutleteroj. Kelkdeko da ili alvenis, kiam ni jam neniel povis ilin utiligi, krom meti en niajn arkivojn.

La lasta ekzemplo, laŭ mia opinio, bone montras unu el la plej gravaj malsanoj en nia koresponda laboro. Kie estas kuracistoj por sanigi nin? Memoru kaj memorigu la malnovan rusan proverbon: "Ovo estas plejvalora nur al la festo."

Minsk. *P. Kirjuŝin.* SAT-ano 4424.

*

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Bulgario. En *Sofio* la loka komitato de la "Laborista" Partio en Bulgario" aranĝis esp-o-kurson, kiun ĉeestas ĉ. 40 laboristoj. La kurso estas gvidata k. kondukata de SAT-anoj. Multaj kursanoj volas aliĝi al SAT, sed ili atendas la finiĝon de la kurso". — **Germanio:** En *Essen* nia movado bone funkcias. En la urba popol-alt-lernejo K-do Ziegler kursas por laboristaj esperantistoj pri la temo: *Faŝismo en Italio*. Paroladoj k. diskutoj nur en esp-o. Krom tio funkcias kurso por komencantoj. Kursoj ankaŭ en *Oberhausen, Bottrop* k. *Hattingen*, gvidataj de SAT-anoj. — **Nederlando.** La *Leidena* grupo vigle laboras. Ĉiuĵaŭde paroladoj pri div. temoj kun agrablaj k. lernigaj konversacioj. —

*

MEMORNOTO

Enhavis enesperantajn artikolojn:

A.I.Z., Berlin, 30. 11. 27. —

Enhavis priesperantajn artikolojn:

Le Matérialiste, Laeken-Bruxelles, novembro 27. — *Sächsische Arbeiter-Zeitung*, Leipzig, 7. 12. 27, 6. 12. 27 k. 9. 12. 27. — *Der junge pionir zaj grajt*, Minsk, 25. 11. 27. — *Bergische Arbeiterstimme*, Solingen, 18. 11. 27. — *Ŝadrinska Gazeta*, 4. 12. 27. —

Represis el Sennaciulo:

Le Matérialiste, Laeken-Bruxelles, novembro 27: Mussolini kontraŭ Mussolini. — *Bergische Arbeiterstimme*, Solingen, 30. 5. 27: Moroj de eskimoj, 24. 6. 27: El Hungario, 30. 7. 27: Sacco k. Vanzetti, 1. 10. 27: Jugoslavio, lando, kie oni povas morti pro malsato. —

Enhavis tradukaĵojn el esperantaj leteroj:

The Labour Woman, London, decembro 27. — *Bergische Arbeiterstimme*, Solingen, 2. 12. 27. — *Poczta*, Varsovio, 1. 12. 27. —

Enhavis notojn pri SAT:

Zvezda, Perm, 5. 11. 27. —

Ĉe la neŭtraluloj.

La 20-a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 3. ĝis 11. aŭgusto 1928 en Antwerpeno. La aliĝo al la Kongreso kostas "nur" 35 belgojn (25 svisajn frankojn, 5 dolarojn).

Vere la neŭtrala kongreso fariĝas lukso!

Esperanto en la lernejoj de Saksio

Laŭ statistiko de oktobro 1927 okazas en Saksio en lernejoj 74 kursoj de esp-o en 53 lernejoj k. 33 lokoj. De tiuj 74 kursoj estas 5 devigaj, 64 elektaj (do povas partopreni la lernantoj, sed ne estas devo), 5 estas privataj. La kursoj okazas en popol- k. metilernejoj.

La Lingva Angulo

— Kie mi trovos tabelon de vortoj kun la sufikso *um*? *3905.*

Vi trovos ĝin en *oficiala Klasika libro de esperanto* ("Kolekto de Esperantista Akademio") itala, hispana kaj portugala partoj.

— Kia estas diferenco inter *ekŝanceli* k. *ekŝanceligi*? *7338.*

Ŝanceli estas transitiva verbo. La formo *ekŝanceligi* estas do gramatike erara.

— Ĉu mi uzu *Siberio* ĉu *Sibirio*?

Mi konsilas al vi uzi *Siberio*. Ĝi estas delonge enradikiĝinta en nian lingvon. Nur lastatempe precipe el naciista vidpunkto kelkaj tendencas renaciigi kiel eble plej la formon de sia lando, nacio, urbo ktp. Kaj tiel ni renkontas Sibirio, nippono (anst. japano), Varŝavo (Varsovio). *Interim.*

Ĵus aperis:
E. IZGUR
NUR VOLU!
La festo de laboro kaj paco
Unuamaja kanto de ribelo
Eldono dua, reviziita kaj ilustrita
Prezo: 0,70 mk. g.
Mendu ĉe Administracio de SAT
Rich. Lerchner, Leipzig O 27
Colmstr. 1 (Germ.)

Poŝtistoj! Telegrafistoj! Telefonistoj!

ATENTU . . . .!

La sola internacia monata revuo de via profesio estas redaktata en esp-a lingvo.

Subtenu ĝin.

Kotizo mirinde malalta, estas nur da **0.50** usona dolaro (helpa kotizo **1** dol.)

Tiu pago entenas la membrecon al la ILEPTO.

Aboniĝu tuj senhezite al

La Interligilo de l' P. T. T.

Sendante monon je la nomo de la ĝenerala gvidanto:

Petro Filliâtre, 54 rue Custine, Paris-18e (Franclando)

INTERNACIA LIGO DE ESP-ISTAJ POŜT-TELEGRAF-OFICISTARO (ILEPTO)

Celas penetrigi esperanton en la praktikan vivon de nia metio

Poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj, radiistoj

ALIĜU . . . .!

La kotizo mirinde malalta (**0.50** usona dolaro aŭ **1** dolaro) rajtigos vin al ricevo sen alia pago de la riĉenhava revuo

La Interligilo de l' P. T. T.

Sendu la kotizojn al la ĝenerala sekretario:

R. J. Filliâtre, 28 rue de l' Agent Dufraine, Saint-Cyr-l' Ecole (Franclando)

La Interligilo de l' P. T. T.

Centra Organo de Fakinformoj

Por poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj, radiistoj.

Aperas seninterrompe depost 1922 kaj donas ĉiumonate en 8 ĝis 12 paĝoj informojn, raportojn, studojn, rakontojn, dokumentojn, ilustraĵojn pri la profesia, korporacia, administracia, teknika vivoj de nia metio.

Enhavas rubrikon senpagan por anoncoj, interŝanĝoj de la anaro.

SENHEZITE ABONU TUJ!

La kotizoj estas **0.50** de la usona dolaro; oni pagas laŭpove helpan kotizon de **1** usona dolaro.

Sendu la abonojn al la ĝenerala gvidanto:

Petro Filliâtre, 54 rue Custine, Paris-18e (Franclando)

Poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj, atentu!

SENPAGE

vi povas tuj ricevi plurajn ekzemplerojn de la vere leginda revuo

La Interligilo de l' P. T. T.

Korporacia, teknika, profesia, administracia, unika en fakmovado.

Kotizo mirinde malalta kun membreco al la ILEPTO.

Petu tuj informojn kaj specimenojn ĉe

Petro Filliâtre, 54 rue Custine, Paris-18e (Franclando)

Helpu al ni!

De la 25-a de februaro ĝis la 6-a de marto 1928, aranĝos la tri fakoj laboristaj asocioj, Radio-, Esperanto- k. Foto-grupoj de Stuttgart, grandan komunan ekspozicion. Por ke ni povu montri, ke ni laboras internacie, ni ankoraŭ bezonas multan alilandan materialon; ekz.: statisikan, teknikan, bildan, ĵurnalojn ktp. Gek-doj! Helpu, por ke ni sukcesu. Ĉiu sendonto ricevos bildkarton de la ekspozicio. La koncernan materialon por ĉiuj 3 fakoj oni bonvolu sendi al jena adreso:

K-do **Alfred Just, Stuttgart,** Hohenheimer Str. 54 a.



En **Vieno** (Aŭstrio) la 21-an de januaro 1928 okazos la **Fondiĝ-Kongreso de la "Aŭstria Ruĝa Frontbatalanta Federacio"**.

Kamaradoj! Sendu salutleterojn, eventuale delegitojn. Por pli detalaj informoj turnu vin al:

LABESKO, Vieno XIX, Grinzinger Allee 7, Bar. 33/37.

K-doj SAT-anoj! Pruvu la praktikan uzeblecon de esperanto por proletaj celoj.

ISK

Internationaler Sozialistischer Kampf-Bund

(Internacia Socialista Batal-Ligo)

Ĝia organo (germanlingva) estas la

Politika Revuo por la klaskonscia laboristo

Ĝi aperas monate kaj pritraktas ĉiam tre gravajn problemojn de la klasbatalo, helpas konvinki la K-dojn pri la veraj kapitalistaj statoj. Tiu ĉi organo estas tre grava batalilo por niaj socialistaj ideoj!

Tial, K-doj, abonu ĝin!

Abonprezo: por 3 monatoj nur 0,60 mk. g.

Provekzempleroj senpage riceveblaj ĉe:

O. Köppen, Schlüchtern (Bez. Kassel — Germ.)

Monata Esperanta Gazeto

Esperanto en Nipponlando

Bone redaktata kaj bone ilustrita gazeto en Japanio.

Jarabono: 15 sm., 3.75 sv. fr. aŭ 15 resp.-kuponoj.

Petu provnumeron (por unu resp.-kup.)!

Eldonejo:

KOKUSAIGO-KENKJŬ-ŜA

Motozono-ĉo, Kôĵimaĉi

Tokio (Nippon)

Ĉiu laborista esperantisto

ŝatas havi por sia propaganda laboro

jubilean esperanto-poŝtmarkon de USSR.

Sendu al adm. de SAT, K-do Lerchner, 0.50 g. mk. kaj al vi senpere el USSR. estos sendita poŝtkarto kun bildo de la marko kaj afrankita per la bela marko mem.

ENHAVO:

Siberio post 10 jaroj, trad. de Zirjanov	pĝ.	97
Infanoj en danĝero, de Norbert	„	97
Junaj sindikatanoj en brita disvenda industrio, de 8500 . .	„	98
Kiel oni preparas en Francio la spiritojn por la venonta "lasta" mondmilito, de Tranĉilo	„	99
Al la laborulo, de 5194 . . .	„	99
Salajroj de instruisto en Sovetio, de 3637	„	99
La kooperativa movado en Britio, de 7516	„	100
"Sennaciulo" — danĝera por la Ĉeĥoslovakia armeo, de 5194	„	100
Vojaĝoj, de 7359	„	100
Patriotismo — Internaciismo Sennaciismo, de E. Lanty . .	„	100
Proletoj rompis limojn, de Norbert	„	101
Kelkaj pensoj	„	101
Tago el mia vivo, de 1840 . .	„	101
Semajno al mia vivo, de 2828 .	„	102
Tra Esperantio	„	102—103
Anoncoj	„	104

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)